

Rolo kaj funkciado de la civitanaj paneloj en la eŭropunia Konferenco pri la estonteco de Eŭropo

Informoj de UEA-Komisiono por eŭropa agado kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)

Kio okazas kun niaj proponoj?

La civitana konsulto havas du elementojn. Ili estas la reta civitana platformo kaj la civitanaj paneloj. La proponoj en la reta civitana platformo estas pritraktataj de la civitanaj paneloj.

Kio estas la civitanaj paneloj?

Ekzistas kvar civitanaj paneloj kun 200 anoj po panelo, entute ili do havas 800 membrojn.

La panelanoj estis nomumitaj, ne eblis kandidatiĝi aŭ postuli partoprenon. Ili estis aleatore selektitaj inter la pli ol 400 milionoj da EU-civitanoj, sed la selekto reprezentante spegulas la civitanaron laŭ sekso, aĝo, eduka kaj sociekonomia nivelo ktp. Junaj EU-civitanoj inter 16 kaj 26 jaroj estas troreprezentataj: triono de la sieĝoj estas rezervataj por ili. Ankaŭ ŝtatanoj de tre malgrandaj membroŝtatoj estas troreprezentataj: almenaŭ unu virino kaj unu viro el ĉiu ŝtato membras en ĉiu panelo.

La panelanoj estas do „averaĝaj“ homoj, ne fakuloj pri io ajn rilate al Eŭropo. Rilate al nia lingvo, ili verŝajne havas la indiferentan sintenon kaj kutimajn antaŭjuĝojn de averaĝaj ne-esperantistoj. Aliflanke ili ne nepre, kvazaŭ reflekse kaj ideologie, kontraŭstaros Esperanton, malsame al kelkaj „fakuloj“ (pri lingvistiko, lingvopolitiko, kulturo). Ili supozeble estas plejparte ne multlingvaj.

Kion faras la paneloj? Kiel ili funkcias?

La kvar paneloj, 200 civitanoj po panelo, laboris ekde septembro. Ilia laboro baziĝas je la proponoj en la civitana platformo. La proponaro estas pretigita de la Komuna Sekretariato de la Konferenco helpe de „komputilaj rimedoj“ (artefarita inteligenco).

La kvar paneloj pritraktas malsamajn temarojn:

- panelo 1: ekonomio, socia justeco, dungado
junularo, sporto, kulturo kaj edukado
ciferecigo
- panelo 2: demokratio
valoroj kaj rajtoj, jura ŝtateco, sekureco
- panelo 3: klimatsanĝiĝo kaj medio
sano
- panelo 4: EU en la mondo
migrado

Proponoj en la deka kategorio de la platformo („pliaj ideoj“) estas dispartigataj inter la estantaj naŭ temaroj. „Pliaj ideoj“ ne estas en si mem temaro pritraktata de iu panelo.

La tasko de la paneloj estas konsideri proponojn en la civitana platformo kaj prepari rekomendojn al la plena sesio de la Konferenco, rekomendojn rilate al kio la EU plie traktu. Fakuloj asistos la panelojn dum la analizo de civitanaj proponoj. Ni klopodas ekscii la nomojn de la fakuloj pri lingvistiko/lingvopolitiko, kiuj estas en la listo de fakuloj, kiun la konferencantoj starigis.

La paneloj evidente ne povos pridiskuti kaj analizi ĉiujn proponojn. Laŭ nia statistiko ilian ŝarĝon nun (septembro 2021) konsistigas inter 1800 kaj 1900 proponoj po panelo (panelo 1, 2, 3) aŭ preskaŭ 1000 proponoj (panelo 4). Ne scieblas, kiom da proponoj ili kapablos analizi kaj pridiskuti. Supozeble la paneloj unue kaj ĉefe okupiĝos pri la plej popularaj proponoj. Propono do estu inter la dudek, kvindek, cent (kiu scias?) plej popularaj proponoj en iu specifa temaro por ke ĝi havu ŝancon esti konsiderata.

Aliflanke la paneloj ne estas devigataj rekomendi iun proponon nur surbaze de ĝia populareco (nombro de apogantoj). Se la panelo post konsidero decidas, ke iu propono ne estas sekvinda, la propono ne eniras la panelajn rekomendojn. Ni ĉiam memoru, ke la civitana konsulto ne egalas referendumon. Pri la gvidlinioj por estonta evoluo de EU kaj realigitaj proponoj fine decidis la konferencantoj, ne rekte la civitanoj (nek per proponoj en la platformo, nek per rekomendoj de la paneloj).

Gravas la analizo kaj takso de la panelanoj: se la panelo ne inkluzivas proponon en siaj rekomendoj, ĝi restos senefika, neniu alia instanco okupiĝos pri ĝi.

La paneloj kunvenas fizike du fojojn kaj virtuale unu fojon dum la Konferenco kaj prezentos siajn rekomendojn en la plensesioj je la jenaj datoj (laŭ la tempoplanado de majo 2021):

- panelo 1: fizike 2021-09-17 ... 19
virtuale 2021-11-05 ... 07
fizike 2021-12-04 ... 05
prezento en la plensesio 2021-12-17 ... 18
- panelo 2: fizike 2021-09-24 ... 26
virtuale 2021-11-12 ... 14
fizike 2021-12-10 ... 12
prezento en la plensesio 2021-12-17 ... 18
- panelo 3: fizike 2021-10-01 ... 03
virtuale 2021-11-19 ... 21
fizike 2022-01-07 ... 09
prezento en la plensesio 2022-01-21 ... 22
- panelo 4: fizike 2021-10-15 ... 17
virtuale 2021-11-26 ... 27
fizike 2022-01-14 ... 16
prezento en la plensesio 2022-01-21 ... 22

Kiamaniere ni povas influi la laboron de la paneloj?

Iomete influi ni nur povas la sorton de novaj proponoj (vidu ekzemple „[The EU needs improved language learning](#)“). Ni povas plialtigi la ŝancon, ke nia propono estos rekomendata por plia agado, se ni faciligas la analizon. Propono estu vortigita kun la fokuso je la solvo de eŭropunia problemo, kaj la solvo per Esperanto estu memkompreneble bone argumentita, kun la sinteno de „neŭtrala“ observanto, ne fervora samideano.

Ni povas plie faciligi la panelan laboron per trafa komentario (eblas aldoni utilajn ligilojn al plia fonto). Ĉiuj komentarioj estos aŭtomate tradukitaj kaj la panelanoj devos tralegi montojn da dokumentoj. Bonvolu ne donu lingvajn lekcionojn kaj ne instruu la historion de Esperanto! Evidu necesan komenton kaj bataladon kun kontraŭantoj! Pensu al nia celgrupo: la panelanoj.

En novaj proponoj ni laŭeble enmetu proprajn homfaritajn, altkvalitajn tradukojn de la propono en la kvin EU-lingvoj kun la plej granda nombro de parolantoj, t.e. la franca, germana, hispana, itala kaj pola lingvoj, krome en la gepatra lingvo de la proponanto kaj en la angla, se la propono estas vortigita en alia lingvo. Pliajn tradukojn ni ĝenerale ne kapablos verki, sed se vi voluntulas disponigi pliajn, vi estas bonvena! Kontakti la kampanjan teamon (EU-kampanjo@gmx.eu), ankaŭ se vi bezonas helpon kun la traduko.

Kial? La platformo uzas la aŭtomatan tradukilon ankaŭ por prepari la panelan laboron. Ni jam konstatis, ke la tradukilo ofte fuŝas kaj nekomprenebla teksto rezultas. Por eviti, ke la panelanoj analizas niajn proponojn surbaze de nebula dokumento, ni laŭeble aldonu proprajn tradukojn, por ke la propono estu havebla en la gepatra lingvo de pli ol du trionoj de la panelanoj.

Resume: La civitanaj paneloj estas kerna elemento rilate al sukceso aŭ malsukceso de por-esperantaj proponoj: sen ilia rekomendo, neniuj proponoj progresos. Ni konsideru la anojn de la paneloj kiel nian celgrupon. Pliaj proponoj estu optimumigitaj kun tio en la menso.

UEA-Komisiono por eŭropa agado (EKU) kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)